



starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO




P. ZAK

1982 · 5 · (93)



Karlovy Vary
Jáchymov
Jánské Lázně
Luhačovice
Františkovy Lázně
Toplice v Čechách
Třeboň
Teplice nad Bečvou
Mariánské Lázně
Poděbrady
Jeseník



ŜLOSILO AL VIA SANO
ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ



KURACRESTADOJN EN ĈEĤOSLOVAKAJ BANEJOJ CERTIGAS
KAJ PLUajn INFORMOJN PRI UNUOPAJ BANEJOJ DONAS:

BALNEA, reprezentace československých lázní a zříděl,
Pařížská 11, 110 01 Praha 1, ČSSR
Telex 122 215, Telefon 263 777

Jiří Kořínek



K i u k o m p r e n a s ?

/ julio 1982 /

Ĉu ni komprenu tion:
por ŝirmi la patrion
reakiritan post jarcentoj
el teno de aliaj gentoj,
rajtas popolo de Moseo
forgesi ĉion el paseo
kaj semi morton kun perfortoj
kiel informas tagraportoj ?
Ĉu vi forgesis jam
rikolton de malam' ,
kiu en Oŝvjencim kaj Majdanek vin trafis,
centmilojn gase murdis, pafis,
dum la rabia bruna pesto ?
Ke malgraŭ mondindigno kaj protesto
viktimis oldaj kaj infanoj
sub la krimulaj sangaĵoj manoj
per senmotiva ekzekuto.
Kial nun same en Bejruto
bomboj de Tel-Avivo
milojn senigas je la vivo
patrujsopirajn ne malpli ol vi.
Kvazaŭ kruel' ĉi povus ion solvi.
Pelatoj de dolar-risorto
haltigu antaŭ venĝ' de l' sorto !
Milit' alportas nur suferon
kaj por ĉi Ter' eĉ mortdanĝeron !
Fine en paco kaj apudo
kunvivi devos islamano kun judo.





Dum la jaro 1982 la multnacia soveta popolo festas la 60-an datrevenon de la fondiĝo de la Unio de Socialismaj Sovetrespublikoj. Ĉefa Esperanto-Asocio elkore gratulas al la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj okaze de tiu grava ŝtata jubileo kaj deziras al la soveta popolo, al ĉiuj sovetaj esperantistoj pluajn sukcesojn en la konstruado de socialismo, por la sekurigo de la paco kaj por plua malstreĉiĝo. Aparte al ASE ĈEA deziras fruktodonan agadon por la estonto.

Rerigardante la historion de Soveta Unio oni povas prave diri, ke ankaŭ la sovetaj esperantistoj donis sian originalan kaj efikan kontribuon al la konstruado kaj firmigado de sia ŝtato tiel, ke ĝi dum la jubilea jaro povas noti konsiderindajn sukcesojn.

Estas ja fakto, ke antaŭ 61 jaroj /21. 8. 1932/ en Praha fondiĝis SAT - unua laborista organizo esperantista, al kiu sovetaj esperantistoj donis grandan kontribuon. SEU, kiu jam provizore fondiĝis en la jaro 1921 kaj plenefike ekagadis en la jaro 1925, dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj evoluigadis mirinde modelan, multflankan kaj tre efikan agadon, kiu estis respektata en la tuta tiama progresema Esperanto-movado kaj devis esti agnoskata eĉ de kontraŭuloj de la Soveta ŝtato. Tiu agado ĝis hodiaŭ restis senprecedenca.

Podzimní zasedání ÚV ČES

se konelo v Praze dne 30.10. Jeho obsah je natolik závažný svým významem, že bude ovlivňovat vitrosvazový život do budoucna zásadním způsobem.

Řítmní členové ústředního výboru a ústřední revizní a kontrolní komise vyslechli nejenom obsažnou zprávu o činnosti předsednictva od 4. sjezdu do současnosti, ale i kritickou analýzu stavu činnosti našeho svazu jako celku. Byly projednány závažné dokumenty jako Plán činnosti svazu na rok 1983 a Rozpočet svazu na rok 1983.

Nezbytným bylo i přijetí směrnic pro hospodaření MS a pro kontrolní a revizní činnost v ČES.

Jenom tyto dva poslední materiály ukazují na cílevědomou a plánovitou činnost vedení našeho svazu zejména pak v těch zásadních směrech: vybavit naši organizaci takovou legislativou a předpisy, které odrážejí současné potřeby i situaci ve svazu.

Diskuse byla velmi živá a obsažná a je dobře, že toto zasedání se stalo opravdovou tribunou lidí, kteří mají zájem posunout činnost a dění v naší organizaci na vyšší, dokonalejší stupeň. Obsah usnesení tohoto zasedání bude závazný pro všechny funkcionáře svazu ať již v sekcích či komisích anebo našich základních organizacích. S jeho obsahem a přijatými dokumenty se mohou členové svazu seznámit na členských schůzích svých organizací, protože budou v plném znění součástí INFORMACÍ, které vydává předsednictvo svazu pro vnitřní potřebu svých funkcionářů.

Kvin jaroj antaŭ la jarcento

1887 * 1982

SPECIALA ANONCO DE LA KOMISIONO DE ĈEA POR PRESO KAJ INFORMADO

Pli ol duonjaran daŭron de nia aranĝo "Kvin jaroj antaŭ la jarcento" /ĝis 30.06.1982/ ni povas bilanci jene: Ses mencioj pri la Esperanto-movado kaj internacia komunikado en la ĉefaj amaskomunikiloj estis sesfoje "rebatitaj"; el 20 propraj artikoloj estis 8 publikigitaj, la aranĝon partoprenis 7 aŭtoroj. La komisiono dankas al s-anoj J. Patera, M. Skrob, J. Karen, MVDr Rytíř kaj JUDr Rajlich pro ilia partopreno /krom membroj de la Komisiono de ĈEA por preso kaj informado/.

Videblas, ke signo "JaMa" /STARTO Nro. 3/1982, pĝ. 17, "Esperanto en gazetoj"/ havas ankaŭ pli detalajn informojn ol nia oficiala komisiono: estus pli ĝuste, se la aŭtoro liverus t.ĉ. informojn al nia komisiono, por ke ni povu informi nian publikon pli amplekse. Ne temas nur pri la publikigitaj artikoloj, sed pri ĉiuj "rebatoj" /termino de UEA/ - per kiuj niaj legantoj-esperantistoj reeas ĉiujn menciojn pri niaj lingvo, movado kaj pri la internacia komunikado.

Por ĝuste argumenti ni denove publikigas pluan bibliografion de la taŭgaj artikoloj el la revuo ESPERANTO: Nro. 914, pĝ. 25 /februaro/: Tibor Sekelj: "Kion opinias ambasadoroj"; Nro. 917, pĝ. 81 /majo/: Vilmos Benczik: "Festo de la Esperanta teatra kulturo" /pri la Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj 19/28-03-1982 en Budapeŝto: pro jama neaktualeco bonvolu nur akcenti, ke la fama kontraŭmilita teatraĵo de B. Vasiljev "La aŭtoroj ĉi tie estas silentaj" - ĉefe: "...a jitra jsoy zde tichá" - estis tradukita en Esperanton kaj ke ĝia prezento ankaŭ estis premiita. Ege gravan informon el kadro de scienco kaj tekniko alportis la 918 - a numero de ESPERANTO sur pĝ. 101: Prof. D-ro Helmar Frank: "Kiel konkeri la 'fortikaĵon'?" /pri la rilato de Esperanto kaj scienco rondo de kibernetiko/. Ĉu eblus elyzi rezultojn el AEST '81 en Žilina kaj speciale tiujn el SAEST '82 en České Budějovice por pli vaste informi la samfakan neesperantistaron? Ĉu nia esperantistaro ĝuos trovi taŭge argumentantan informon de nia scienc - teknika sekcio ankaŭ en la ĉefaj amaskomunikiloj?

La lasta informo estas por niaj esperantistoj-grafikistoj en la revuo ESPERANTO: en Nro. 914, pĝ. 25 /februaro/ estis anoncita publika konkurso pri JUBILEA SIMBOLO /limdato 31.10.1982/ kaj en Nro. 917, pĝ. 82 publika konkurso pri JUBILEA AFISO /limdato 31.12.1982/. La projektoj estu sendataj al Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Jaroslav Klement,
komisionestro

La novjara mesaĝo de prezidanto de UEA, s-ano Grégoire Maertens, en kiu li emfazas la gravecon de niaj preparoj por la Internacia Jaro de Komunikado, estas instigilo por ni ĉiuj, enhavas tre utilajn konsilojn.

Generale, la komunikado mem estas ankoraŭ subtakdata kaj la rolo de la Internacia lingvo en ĝi, despli.

Preparante nin por diversspecaj diskutoj ni devas unuigi en la nocioj kaj metodoj.

Kio estas Komunikado?

-reciproka kontaktado, informado, homa kunekzistado,

-gravega ero de la paco,

-necesaĵo por la scienca progreso,

-nepreĵo por la amikeco inter la homoj kaj popoloj.

Kiel konate, dum la tuta homa historio, ĉiu progreso en komunikado estis ĉiam aŭ kaŭzo aŭ kunaganto de nova epoko /parolkapablo de la homo, skribo, tipografio, telekomunikado/. Nun ni venas al la ĝisnun lasta stupo: al la interlingvo.

Ofte ni fieras, ke ni vivas en la epoko de scienco kaj tekniko. Sed vidu: post preskaŭ 200 jaroj de internacia uzado de metra sistemo, en kelkaj landoj oni ankoraŭ kalkulas kaj mezuras per diversaj mejloj, bareloj, uncoj, diversaj koloroj ktp.

La Unuigintaj Nacioj, UNESCO, per sia decido proklami la jaron 1983 Internacia Jaro de Komunikado montris, ke la komunikado estas vere unu el la bazaĵoj bezonoj por plua evoluo. Samtempe ni povas varme saluti tiun ĉi decidon, ĉar ĝi pravigas niajn strebadojn pri faciligo de interhomaj kontaktoj, kaj ĉar ĝi donas al ni spacon, nerekte subtenon. La jaro 1983 estas vere konvena preparo por la jaro 1987, proklamota kiel Internacia Jaro de la Internacia lingvo.

Kaj denove, kiomfoje jam, ni venas al la demando de informado. Estas grandparte nia kulpo, ke la publiko scias preskaŭ nenion pri Esperanto; multaj personoj kaj institucioj ne estas malamikaj al ni, ili nur ne estas informitaj. Ni devas pacience informadi, montri sukcesojn kaj rezultojn. Pro tio ni studu la eblojn kaj formojn de informado:

La sekretario de ĈEA nuntempe labore ne kapablas eldonadi iuspecajn Informilojn, entenantajn novaĵojn, kompilitajn el raportoj de niaj lokaj grupoj, komisionoj aŭ sekcioj, el diversaj periodaĵoj. Estus rekomendinde pripensi la eblon, ĉu iu loka grupo volus transpreni eldonadon de tiu Informilo, kaj dissendadi ĝin, laŭ abono, al lokaj grupoj /kies patronoj certe pagus la abono/, kaj ankaŭ /senpage/ al presagentejoj, junularaj, sciencaj aŭ turismaj centrejoj, ĵurnaloj ktp. /Iom similan al la Bulteno de la loka grupo en Brno/.

Ni konsciiĝu, ke post dekoj da jaroj, denove nun, kaj ĝuste nun, prezentigas la historia ebleco: transpaŝi la sojlon. Ni ne rajtas preterlasi la epokan okazon.

-jl-

La 28an de marto 1982 oni rememoris la 390an naskiĝtagon de Jan Amos Komenský-Comenius /1592 - 1670/, kiu estis elstara ĉefa filozofo, mondkonata pedagogo kaj entuziasma plejanto por kompleksa sistemo de la ĝenerala klerigo, verkisto, oratoro, kartografo, lingvisto, politika reprezentanto de la ĉefaj ekzilitoj /post la malfeliĉa batalo sur la Blanka Monto 1620/, sincera humanisto kaj demokrato k.a.: la lasta grandformata universala sciencisto. Pro siaj principaj laboroj sur la pedagogia tereno li akiris honoran kaj dankplenan alnomon "Instruisto de la nacioj".

Komenský vigle interesiĝis ankaŭ pri la problemoj de universala lingvo, kiu - laŭ lia konvinko - solvus problemon de florigo kaj disvastigo de la ĝenerala klerigo kaj kiu grave kontribuis al la paca kunvivado de la homaro. Sian opinion pri la neceso, signifo, rolo kaj baza strukturo de estonta universala lingvo li esprimis en siaj verkoj Via lucis /1641/, Pansophia diatyposis /1643/, Methodus linguarum novissima /1646/, Unum necessarium /1668/, Triertium catholicum /1670/ kaj ĉefe en De rerum humanarum emendatione consilium catholica /speciale en la 5a parto nomita Panglottia, manuskripto retrovita nur en 1935/. Oni fakte povas konsideri Komenský kunfondinto de la moderna sciencobranĉo - interlingvistiko. Pro la ideoj, esprimataj de Komenský pri la lingvo-problemo, la esperantistoj konsideras lin samideano kaj kunbatalanto por la nobla idealo de la internacia kompreniĝo kaj fratiĝo.

La rilaton de Komenský al la internacia lingvo pritraktas multaj verkoj, venintaj plejparte el plumo de esperantistoj. La plej kompleta bibliografio de ili aperis en 1971 /vidu n-ro 6 de la suba bibliografio/. Honore al la ĉi-jara jubileo de Komenský ni publikigas daŭrigon de la bibliografio de Esperantaj verkoj koncernantaj Komenský kaj lian interlingvistikan laboron. /Por la eventualaj kompletigoj de ambaŭ bibliografioj fare de la legantoj anticipan dankon./


V. Novobilský

Bibliografio de Esperanta literaturo pri J.A. Komenský - Comenius

Kompilis: Vlastimil Novobilský

1. Barandovská, Věra: Návrhy J.A. Komenského na mezinárodní jazyk /Proponoj de J.A. Komenský koncerne internacian lingvon/. En: Sborník prací filozofické fakulty Brněnské univerzity. A 27, 1979, pĝ. 235-242
2. Bouška, Karel Hynek: Granda instruisto de la nacioj. La vivo kaj laboro de Jan Amos Komenský. Portugala Eldona Rondo, Porto 1981, pĝ. 45.

3. Horský, Rudolf: J.A. Comenius - la profeto de la paco por la mondo. Dia Regno, 1967, n-ro 12
4. Jedličková, Věra: Komenského návrhy na založení mezinárodního jazyka /Proponoj de Komenský pri fondo de internacia lingvo/. Diplomlaboro. Filosofia fakultato. Universitato de J.E. Purkyně en Brno, 1975. Pĝ. 109.
5. Komenio kaj la internacia lingvo. Kompilis O. Kníchal. Fragmentojn el la verkoj de J.A. Komenio esperantigis V. Novobilský kaj O. Kníchal. Ekstra represo el la revuo Paco, 1974, pĝ. 16.
6. Novobilský, Vlastimil - Lins, Ulrich: Bibliografio de Esperantlingva literaturo pri Comenius /A Biography of Literature on Comenius in Esperanto/. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda Lingvo-problemo. London-Rotterdam, A/I/2 /a-e/, 1971
7. Novobilský, Vlastimil: Comenius kaj internacia kompreniĝo. Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda Lingvo-problemo. London-Rotterdam, A/I/1 /e/, 1971.
8. Novobilský, Vlastimil: Omaĝe al Jan Amos Komenský-Comenius. Internacia pedagogia revuo. 1971, I, n-ro 2, pĝ. 5-8
9. Novobilský, Vlastimil: Comenius and international Understanding. Centre for Research and Documentation on the Language Problem. London-Rotterdam. A/I/1 /a/, 1971
10. Novobilský, Vlastimil: Informatika a problém mezinárodního plánovaného jazyka v období vědecko-technické revoluce /Informadiko kaj problemoj de internacia planlingvo en la epoko de la scienca-teknika revolucio/. En: Sborník Pedagogické fakulty v Ústí nad Labem /Ĉeĥoslovakio/, řada chemická. Praha, SPN, 1979, pĝ. 5-22
11. Novobilský, Vlastimil: J.A. Komenský a interlingvistika /J.A. Komenský kaj interlingvistiko/. En: Sborník z konference k 390. výročí narození J.A. Komenského /Almanako el konferenco honore al la 390a naskiĝtago de J.A. Komenský/. Pedagogická fakulta v Ústí nad Labem /Ĉeĥoslovakio/, 1982, pĝ. 20-34
12. Stojan, P.E.: Bibliografio de internacia lingvo. Bibliografio de Universala Esperanto-Asocio. Tour de l'Île, Genève, Svislando, 1929. Pĝ. 560. /Pri J.A. Comenius vidu pĝ. 32./
13. R.Horský : Comenius, la profeto de la paco Dia regno /1967/ n-ro 12, ~~pĝo 1208-1209.~~



Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA

Teknika vortaro ĉeĥa-Esperanta - ĝia longe promesata aperigo estas ankoraŭ ĉiam prokrastata. La kaŭzoj estas pluraj, unu el ili estas la klopodo de la aŭtoroj pri plejebila perfekteco de la vortaro. La STS-komitato kaj la aŭtoroj kunsidintaj en České Budějovice okaze de SAEST '82 decidis fini la redaktan laboron pri la unua parto de la vortaro ĝis fino de februaro 1983 kaj la tekston disponigi por t.n. nula /ciklostila/ eldono. Tuj post la unua parto /reprezentanta proksimume trionon de la vortaro/ komencos inĝenieroj Bednařík, Fluhař kaj Werner redakton de partoj 2 kaj 3.

La popularscienca revuo Ĥimiĵa i ĵiznj /Kemio kaj vivo/ aperanta en Moskvo en 365 000 ekzempleroj publikigas en siaj numeroj julio ĝis oktobro 1982 la 16-lecionan E-kurson por scienceteknikaj laborantoj. La ago de la redakcio estas unika evento. Por plene sukcesigi ĝin estas necesa paralela agado en la ceteraj landoj. La STS de ĈEA entreprenis tiurilate la unuajn paŝojn.

Interkomputo-82. Internacia komputo-sciencia simpozio, Budapeŝto, 1982-12-27/1983-01-02. La unuan fojon okazigas neesperantista faka organizaĵo /La Komputo-sciencia Societo "Neumann János" NJSZT/ internacian simpozion, kies unusola labor-lingvo estos Esperanto. La simpozion aŭspicias SEC de UEA en Budapeŝto. - Monda adresaro de komputistoj-esperantistoj atingis 831 adresojn el 42 landoj.

SVIEKO-84. Dum majo 1984 okazos en Sviŝtov, Bulgario la 3a scienca konferenco pri la rolo de la ekologia faktoro en la teritorio-organizado de la homa socio kaj ekonomio. La elektita temo estas: La rolo de la ekologiaj faktoroj en la estonta disvolvigo de la homa socio kaj ĝiaj ekonomiaj loĝlokaj sistemoj. La manuskriptojn /15 tajpitajn pagojn/ sendu ĝis 1983-01-30 al prof. Ĥristo Marinov, Ekologia universitato BG-5250 Sviŝtov, Bulgario.

Hatnyelvű geodéziai szakosztár /Geodezia fakterminaro en ses lingvoj/ Red. D. Csátsai, Budapeŝto: Budapeŝta Geodezia kaj Kartografia Entrepreno, 1976 /vol. 1/ kaj 1982 /vol. 2/. 322 kaj 388 p. Lingvoj: angla, Esperanta, franca, germana, hungara, rusa. /La antaŭparolo kaj la difinoj de la terminoj estas nur hungarlingvaj./

Telekomunika vortaro. Ing. Christian Bertin /CCETT VRE/TDP, B.P. 1266 F-35013 Rennes Cédex, Francio/ pretigas okaze de la Monda Komunika Jaro-1983 Esperantan telekomunikon vortaron. Al ĉiu helpema fakulo li disponigos trilingvan vortaron /franca, angla, hispana/ por ke oni proponu E-tradukon de kiel eble plej multaj terminoj.



Didaktikaj ludoj



La didaktikaj ludoj estas tre valora rimedo por aktivigo de lernantoj. La lernantoj akiras per ili pretecon en praktika uzado de Esperanto. La ludoj kreas naturajn parolsituaciojn, kiuj ekinteresas ankaŭ singenemajn lernantojn. Ludoj alproksimigas lernantojn en amika kolektivo. Per lingvaj ludoj oni povas traekzercadi: unuopajn vortojn, ŝanĝi kaj krei frazojn, ĉermaniere disvolvi frazojn, ekzerci konversacion, memstaran rakontadon ktp.

Ludoj povas esti parolaj kaj skribaj, al kiuj apartenas divenado de enigmoj kaj krucenigmoj. Ludoj havas en instruado de Esperanto rimarkindan aktivigan signifon. Oni povas ilin dividi en kvar grupojn:

1. Ludoj por ekzercado de unuopaj vortoj,
2. ludoj por memstara kreado de frazoj,
3. konversaciaj ludoj,
4. ludoj por kontinua rakontado.

Ludoj por ekzercado de unuopaj vortoj:

1. Vortvico:

La lernantoj vicigas vortojn tiel, ke ĉiu ripetas antaŭan vorton kaj aldonas novan vorton.

Ekzemple: fenestro

fenestro, pordo
fenestro, pordo, plafono
ktp.

La vortojn oni povas elekti teme: En la ĉambro estas...
En la urbo estas... ktp.

2. Vortĉeno:

La lernantoj vicigas vortojn tiel, ke ĉiu nova vorto komencas per lasta silabo de antaŭa vorto.

Ekzemple: arbo- bopatro- roko- kontroli- libido- domo- ktp.

Oni povas uzi vortaron, per kio la lernantoj ekzercadas la rapidan orientigon en ĝi.

3. Kompletigado:

La instruisto skribas sur la tabulon la unuan kaj lastan literojn de iu vorto kaj inter ilin tiom da paŭzosignoj, kiom da literoj forestas. La lernantoj strebas trovi donitan vorton.

Ekzemple: F - - - - - o, T - - - - o, P - - - - o ktp.

/Daŭrigota/

Jaroslav Polenský



Z á m ě n a a o m l u v a

Velice se omlouváme za nedopatření, které vzniklo tím, že nám tiskářský šotek zaměnil fotografie dvou členů našich orgánů Františka Patery a Jiřího Patery. Prosíme je o laskavou omluvu a vás o porozumění.

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-
avolo - duparta pordego - deklina
tegmento - sen planko - facila mu-
ntado aŭ sur submuro aŭ sur ebe-
na tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-
ga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adre-
so de komerca fako: INKLEMO PRA-
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA
9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49.
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-
mizojn ni liveras nur al privatuloj.

Sedlčany

KDS

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj
tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro
de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la
malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR
Eksportas MERKURIA Praha

Dobre nakŭpíte

POTRAVINÁRSKY A PRIEMYSELNÝ TOVAR
v obchodných domoch


SPOTREBNÝCH DRUŽSTIEV



VO VÄČŠINE NAŠICH OBCHODNÝCH DOMOCH
JE ZABEZPEČENÉ OBČERSTVENIE A PODÁVANIE STRAVY



FRANTIŠEK PIŠÁK - membro de Centre Komisiono de ĈEA, estro de la politikeduka komisiono de Asocio, sed ĉefe eminenta, karakterata homo kaj esperantisto forpasis dum 6.10.1982. Estas tio granda perdo por nia asocio, ke li jam ne povas per siaj saĝaj konsiloj helpi al ni. Honorigu lian memoron.



ni recenzas

La lernejo de Winnetka estas titolo de 23-paĝa kajereto. La verketo pritraktas sistemon, spertojn kaj pozitivajn rezultojn de nova eduka kaj instrua maniero enkondukita ekde 1919 en usona urbeto Winnetka apud Ĉikago far Carleton Washburne. Tiu nova edukmaniero celas per spontana memdisciplino, per reformita instrusistemo de ĉiuj objektoj, inkluzive la manlaborojn, la muzikinstruon k.a. atingi pliajn kapablojn de lernantoj, ilian adaptiĝemon al la praktika vivo, ilian memstarecon kaj preparecon por la plua altilerneja studoj. La libreto precipe interese pedagogojn, eĉ se eventuale renkontos ias dubojn aŭ opojn. La praktikaj spertoj laŭaserte jam sufiĉe pruvis avantaĝojn de Winnetka-instrusistemo.

La verketo estas prezentita en tre bona lingvaĵo sen preseroj kaj mi povas ĝin rekomendi.

Jiří Kořínek

Mária Jančová: Avinjo Rakontas. Tradukis Juraĵ Záhora kaj František Revay. Aperis kiel aldonajo al la 4-a n-ro 1981 de Esperantisto Slovaka. Rotaprinte presita, paĝoj 56, formato 20 x 15 cm, prezo 6 Kčs.

Slovaka meritplena artistino Mária Jančová /naskiĝinta 1908 en regiono Orava/ rakontas en 12 porjunularaj ĉapitroj pri la pezega vivo de malriĉaj senhavuloj en Slovakio dum la pasinta jarcento. En la rakontoj de avino al sia malsana nepineto riveligas al ni la malfacila vivo de kampara laboristo en tiutempa sociala misordo, kiu por la hodiaŭa junularo ekŝajnas preskaŭ nekredebla. La traduko estas lingve tre bona. Preseraroj preskaŭ forestas. Korektindaĵoj estas du-tri preterviditaĵoj. Belaj estas trafe elektitaj pluraj esprimoj, ekz. p.26 arbidejo - ŝkolka, arbarstumpejo - paseka, p.28 forparoli la sonĝon - zamluvit sen k.s. Mi rekomendas la libreton kiel interesan legaĵon ne nur por la junularo.

Jiří Kořínek

Todor Jivkov: Raporto de la Centra Komitato de Bulgara komunisto partio antaŭ la XII kongreso kaj la antaŭstarantaj taskoj de la partio. Sofia. Pres. Sofia 1981, 107 pg kaj portreto de T. Jivkov. Prezo ne montrita.

La Raporto analizas la ĉefajn rezultojn de la parti-agado por efektivigo de la partia programo kaj la sepa jarkvino, pri kiu T. Jivkov diris: "En sia historio socialisma Bulgario ne havis tiun fruktodonan periodon de soci-ekonomia kaj kultura disvolviĝo, kiel dum la raportata sepa jarkvino".

La Raporto konsideras plue fundamentajn direktojn kaj problemojn de la bulgara ekonomia politiko, rimedojn por efektivigo de la sociala kaj kultura politiko kaj perfektigon de la politika sistemo kaj pluan disvolviĝon de la socialisma demokratio. Granda atento estas dediĉita al la stato kaj la taskoj de Bulgara komunisto partio. Lasta parto de la Raporto pritraktas evoluon de la internacia situacio kaj eksterlandan politikan agadon de la partio.

Aldone al la Raporto estas publikigita parolado de T. Jivkov ĉe la fermo de la XII kongreso de Bulgara komunisto partio.

La broŝuro prezentas plian gravan kontribuon al la serio de la bulgara politika literaturo eldonita en Esperanto.

VN

Trifon Ĥristovski: Mia vivo. Tradukis Nikola Aleksiev, redaktis Asen Grigorov, eldonis Sofia Pres 1981. Paĝoj 180, formato 19,5 x 12,5 cm, kartonita.


Jen autobiografio de homo trasuferinta sian heroan vivon ekde la lulilo ĝis la frua morto de apenaŭ kvardekjarulo. Trifon Ĥristovski naskiĝinta 1904 en povraj cirkonstancoj de tiama bulgara vilaĝo, estis kiel duonjara bebo trafita de la poliomjelito. La infana paralizo kripligis por la tuta vivo ambaŭ liajn kruojn kaj la dekstran manon. Nekapabla paŝi li restis sen ajna lerneja eduko, sed per spirita energio kaj forta volo li klerigis autodidakte kaj fariĝis fine verkisto. En la libro ni akompanas spirretene la knabon, junulon kaj viron tra duraj plagoj, kiuj trafis lin kaj lian familion dum krizoj kaj eventoj de du mondmilitoj kaj la okazintaĵoj de la intermilitaj jaroj en Bulgario. Li, peze handikapita, estas dum la vivo trafita de pluaĵaj gravaj malsanoj, daŭre luktante kun doloroj kaj danĝeroj travivas psikajn krizojn, kiuj kondukas lin ĝis la sojlo de sinmortigo. Li trapasas suferojn de senespera enamiĝo, perdas sinsekve kvar gefratojn, vidas ĉirkaŭ si la kruelaĵojn de tiama bulgara faŝisma firegado kaj ekkonas tiam sian lokon kaj taskon en la socio kaj ekluktas sentime por la pli justa sociordo. Ĉin li ne gisvivas mortante kelkajn monatojn antaŭ liberigo de Bulgario.

La vivo de tiu korpe febla, sed spirite forta homo, kiu rememorigas min pri simile heroa vivo de surdmuta blindulino Olga Skorohodova, profunde emociis min. Legu ĝin, legu ĝin ĉiu, kiun afliktas ofte maledifaj cirkonstancoj de nia ĉiutaga vivo, de fineglektemo kaj egoismo de homoj, homoj sanaj, sed fuŝantaj la idealojn, por kiuj niaj bravaj antaŭuloj suferis kaj vivofere batalis.

La libro estas lingve bonnivela. Sur 180 paĝoj ne multas preseraroj /ĉ. 20/. Korektindaĵas estas jenaj malgustaĵoj: p.18: povis eliri eksteren en pura aero /en puran aeron/, p.25: prenis min en la brakoj /en la brakojn/, p.28: ...kun nuditaj ŝvelintaj piedoj /nudigitaj/, p.29: Mi iris...sur la vilaga placo /sur la vilagan placon/, p.36: ...reĝo Midaso, kiu estis punita pro lia avido /pro sia/, p.37: posedis nur ...malinteresa libro /malinteresan libron/, p.40: komence venis aŭguri al si nur virinoj /aŭgurigi/, p.44: mi deziris eliri...sur la strato /sur la straton/, p.74: ke la atakito /atakinto/, p.84: ...nin lasis veni ĉe la barilo /al la barilo, ĉe la barilon/, p.129: Kie ajn kaj kio ajn okazis io, /"io" forstrekis/, p.140: ...kaj historiajn revuojn tiam ne aperadis /historiajn revuoj/, p.158: ...lasi estingiĝi ...unu granda spirito /grandan spiriton/.

Jiří Kořínek

RONDETA VIVO



OSTRAVA-VŽKG - LG preparis en la KINEJO VITEK ekspozicion pri HIROŜIMA-NAGASAKI laŭ japana libro sendita al ni pere de esperantistoj. La ekspozicion vidis ĉirkaŭ 8 000 da homoj inter 26.6-30.6.1982.

PRAHA-OSTRAVA-OLMOUC estis lokoj, kiujn vizitis 34 persona grupo de esperantistoj

el USSR. Unufoje postmilita okazis, ke turista grupo estis nur pure "esperanta". Niaj membroj, kiuj kunvenis kun sovetaĵ semideanoj longe rememoras tiun amikan etoson. Ĉu ankaŭ inter niaj membroj estas intereso grupiĝi por simila vojo al USSR? Multaj el ni trovis novajn geamikojn kaj demonstris uzeblecon de internacia lingvo.

LANŠKROUN - LG preparis por sia publiko interesan ekspozicion kun aktuala porpaca motivo. En la halo de historia urbodomo meze sur la ĉefa placo estis instalitaj bildoj kunligitaj kun datreveno de detruo de japanaj urboj Hiroŝima kaj Nagasaki.

ZdP

ZNOJMO - La klubo aranĝis prelegon pri SET 1982 en Lančov. Partoprenis pluraj geklubanoj, partoprenintaj la tenderon.

La 2.9. ekfunkciis kurso de Esperanto por komencantoj. Aliĝis 14 gejunuloj.

PRAHA - Esperanta klubo en Praha komencis ankaŭ kursojn por interesantoj. Unu el ili jam okazas en nova klubejo en Vladislavova strato, Praha 1.



Per ĉiuj 25 vortoj vi pagas 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Korespondos kun prahano 26-40jara: Simoga Csaba, Dörzsik utca 2 Sátorajlájhely, Hungario.

Ing. Novotný Jiří, U půjčovny 4, 110 00 Praha 1, serĉas interesantojn pri speleologio kaj pri montgrimpado el tute mondo.

*

Boris UHER, Strakatého 17, CS-636 00 Brno, volas interŝangi aŭ vendi uzitajn ĉeĥoslovakejn PM

KRONIKO

Ĉiam aktiva kaj oferema s-ano Bohumil V o p r ŝ á l, membro de LG en Lanškroun komence de novembro '82 okdekjariĝas! Firman sanon kaj bonhumoron ni ĉiuj deziras al li.

el leterkesto

Vážená redakce ... tak začíná dopis J. Navrátila z Bohesudova, který se zúčastnil letošního Letního esperantského tábora v Lančově a pokračuje "Jaké mám dojmy? Většinou dobré. Poznal jsem mnoho lidí, mám nové kamarády, rád se zapojujím do hnutí esperantské mládeže v sekci mládeže ČES Měli jsme jisté problémy s večerkou. Víím, táborový řád se musí dodržovat, platí pro každého Nakonec jsme se / bylo nás pár mladých starších 18 let / částečně dohodli se zástupcem vedoucího tábora Mám hezké vzpomínky a rád se zúčastním dalších etap LET. Pošílám fotografie z letošní I. etapy ...

A my dodáváme - inu, přísnost musí být ale je dobře, že to takhle mladí chápou. Nebude to možná dlouho trvat a sami povedou, anebo budou zástupci vedoucího tábora Tak, gis la revido dum la SET 1983!!!

Venis letero de Kurt Langer el Dresden, kiu priskribas spertojn el propra vojo al nia lando kaj takses ĝin / la vojon / kiel "fajren bepton" - ĉar li estis nur freŝa esperantisto. Vizitis amikojn en Svítav, Žilina, Rájecké Teplice, Bratislava, Pardubice kaj Praha. Al ĉiuj, kiuj helpis dume li, en letero, dankas.

V í t e , ž e

loď SENREVENO bloudila galaxií - spíše se měla jmenovat DIREKTO FELIČA - když už se musela jmenovat esperantsky - a konečně přistála na planetě KVARA ...

Bazilea si povzdechla: "Učit se? Leda esperantu ... taky se předkové mohli dohodnout na jedné společné řeči, když stejně všem vyhovět nemohli. Nač deset jazyků? Teď máme esperanto zbytečně navíc." Stiskla tlačítko, ozvala se věta výrazně vyslovená: "BONAJ VERKISTOJ ESTAS, ESTIS KAJ ĈIAM ESTOS AMATAJ DE SIAJ LEGANTOJ." Bazilea promluvila s chybou v přízvuku. "Špatně," řekl přístroj, "dávaj pozor: BONAJ VERKISTOJ ..."

Milena později škádlí Bazileu: "Objednala jsme esperanto. Pro oddech." "TIE ĈIE KAJ NUN" - řekla si Bazilea pro sebe tátovo heslo.

- - - V edici KARAVANA svazek č.153 vyšel titul STRACH NA PLA-
NETĚ KVARA - - - autorka gymnaziální profesorka Ludmila FREIOVÁ.

- ný

Plurjarajn fratajn kontaktojn kun niaj esperantistoj kaj instruadon de Esperanto en la plej granda lernejo de Hanojo tre favore menciis ĝia direktorino en raporto de redaktoro J.Kubeš prezentita en tutŝtataj televidaj vesperaj novaĵoj /Ia programo 19,30 la 15-an de septembro '82/.

-jelc-

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

Ŝakturniro pri migranta pokalo de AESSR

La 13-an de novembro '82 okazos en Domo de Sindikatoj en Žilina III-a ŝakturniro pri migranta pokalo de AESSR. Ni invitas ĉiujn ŝatantojn de ŝakludo partopreni tiun ĉi ŝakturniron.

Ĉiuj partoprenantoj estos honorigitaj per diplomo kaj la plej bonaj ricevos valorajn premiojn. La ŝakturniron povas partopreni ĉiuj ŝakludantoj - Esperantistoj, sed la migranta pokalo estos aljuĝita al la plej bona ŝakludanto - ano de AESSR.

Programo de la ŝakturniro:

- 9,00 horo - malfermo de la ŝakturniro - lotumado
 - 9,30 horo - unuaj konkursaĵoj ludoj
 - 18,00 horo - fermo de la ŝakturniro, honorigo de partoprenantoj per diplomoj kaj premioj.
- Partoprena kotizo Kčs 25,-. Limdato por aliĝoj: 31-a okt.'82
Aliĝojn kaj informojn laŭ la adreso: Miroslav SALÁT,
02341 Ne sl u š a 805

D ŭ l e ž i t é

Abychom upřesnili předchozí sdělení o distribuci esperantských časopisů dodáváme:
sekretariát svazu bude v příštím roce distribuovat zájemcům pouze tyto tituly: STARTO, SANO, PANORAMO, HdE a slepecký tisk.

Pomocí sekcí bude zajišťována distribuce PACO a Intern. fervojisto. Pokud se najde zájemce z řad odběratelů o časopis Dia regno, pak objednáme i tento titul. Jinak jej od příštího roku nebudeme zajišťovat.

Sekretariát je stále více zatěžován pracemi, které by měly spadat především do činnosti krajských výborů důvěrníků nebo odborných sekcí či komisí. Ani prostory ani personální vybavení nedovolují takto pokračovat. Znovu vás proto žádáme, abyste si přečetli rozsah působnosti a odpovědnosti jednotlivých funkcí, které níže uvádíme a na ně se přímo obraceli se svými dotazy. Sekretariát ve většině n e m ů ž e nic jiného udělat, než váš dopis zaslat příslušné osobě. To samozřejmě nepřispívá ke snížení agendy, k rychlému vyřizování vašich přání ani k vzájemné společenosti.

Ve Startu č.2 jsme uvedli všechny funkcionáře a vedoucí sekcí či komisí s plnými jejich adresami. Nyní však rozepisujeme ještě šířeji o co se starají a za co zodpovídají:

Dr.Jar. Jermář

- řeší spory v organizaci, účastní se některých zásadních jednání s orgány, reprezentuje svaz

Ing. Vl. Kočvara

- odpovídá za pedagog. a kulturní oblast, ediční činnost, řídí sekce pedagog., literárně-uměleckou, komisi pro tisk, pro jazykové otázky a pro zkoušky ze znalosti jazyka

Věra Podhradská

- odpovídá za mládežnické hnutí, činnost sekce pro spolupráci s MEM, připravuje plány školení a semináře, řídí sekci mládeže, sekci pro mírovou činnost a spolupráci s MEM, politicko-výchovnou komisí

Zdenko Křimský

- řídí sekretariát svazu, ekonomickou a obchodní činnost svazu, připravuje základní směry a koncepce pro činnost svazu, jedná s orgány a organizacemi v ČSSR i se zahraničními partnery, řídí a odpovídá za turistiku a činnost turist.komise

Josef Novák

- odpovídá za činnost sekcí: železničářů, VTS, zdravotníků a nevidomých

Frant. Patera a
Stanislav Papírník

- spolu řídí a odpovídají za činnost KV důvěrníků a MS svazu a podávají informace o ustavování MS

Pro lepší spolupráci mezi našimi a slovenskými esperantisty vám uvádíme rovněž vedoucí sekcí a komisí AS SSR

S e k c e :

M E M
Pedagogická

- Daniel Papák, Švermova 35/I 040 01 Košice
- Ladislav Janovský, Sad pionierov II/C/9 984 01 Lučenec
- Stano Marček, Zvolenská 15 036 01 Martin
- Ing.Aleš Bednařík, Lotyšská 8, 821 06 Bratislava

Mládeže
Vědecko-technická

Turistická	- Peter Pavúk, Jilemnického 17/9 052 01 Spišská Nová Ves
Ochranu přírody	- Ladislav Nulasz, Jilemnického 21 059 21 Svit
Železničářů	- Ing. Štefan Danišovský, Slovenského odboja 179/13 058 01 Poprad
Šachistů	- Miroslav Salát, 023 41 Nesluša 805
K o m i s e :	
Pro výzkum	- Mária Chaloupková, Hviezdoslavova 99 900 31 Stupava
Literárně-ediční	- Dr. Magda Šaturová, Javorinská 31 811 03 Bratislava
Pro lingvistiku	- Stanislav Košecký, Sklatinská 1 831 06 Bratislava - Ruča
Medicínská	- Dr. Štefan Granda, Juh bl. Antimon 3 058 01 Poprad

PROPAGAČNÍ LETÁK v češtině a esperantu je k dispozici. Autoři Jaroslav Klement a Pavel Rak. Náklad 10 000 ks. Bude sloužit pro různé akce a k náboru nových zájemců.

Objednávejte na adrese: Josef Novák, pošt.schránka 103
466 01 Jablonec nad Nisou.
K objednavce přiložte známky v hodnotě Kčs 2,-. Jednotlivcům bude zasíláno maximálně 5 kusů letáků zdarma, místním našim skupinám podle jejich nezbytné potřeby. Rovněž je nutné zasílat známky/min. ve výši 3,-Kčs, pokud váš požadavek bude vyšší než 30 ks, jinak stačí hodnota 2,-Kčs./Rovněž MS si budou objednávat letáky na výše uvedené adrese. Nepište tedy do sekretariátu svazu - vaše objednávky zde nebudou vyřizovány.

STARTO 1983 - novaj limdetoj por akcepti viajn kontribuaĵojn:

n-ro 1/83	30.01	n-ro 4/83	30.07
n-ro 2/83	25.03	n-ro 5/83	15.09
n-ro 3/83	27.05	n-ro 6/83	15.11

Jaroslav Ježek, slavný hudební skladatel dnes již nezapomenutelných melodií byl nejenom příznivcem esperanta, ale sám se mu učil. A víte, kdo byl jeho učitelem? Sotva byste to uhádli - náš čestný člen svazu a donedávna předseda pedagogické sekce Vuk ECHTNER.

Radim Kalous, přímý spolupracovník Alberta Schweitzera a jediný Čech, který pracoval v Lemberené je spolupracovníkem redakce našich národních čísel PACO.

O všech těchto zajímavostech, ale i mnohých dalších překvapeních se dočtete na stránkách připravovaného seriálu rozhovorů se zajímavými lidmi, které připravuje redaktorka PACO ing. Mergit Strnedová již od začátku příštího roku. Nezapomente si tedy zajistit pro sebe připojeným korespondenčním lístkem vydání všech národních čísel vydávaných k základní řadě, kterou dostanete prostřednictvím PNS. Národní čísla u nás, včetně poštovního dostanete za Kčs 16,-.

FONDIĜIS JUNULARA SEKCIO DE ĈEA (JS ĈEA)



Dum 8a ĝis 10a de oktobro en urbo Ždár n/S. kunvenis 50 da junaj geesperantisto - reprezentantoj de nia junularo por elektiti 5 personan estraron kaj decidi pri la statuto de novfondita asocio sekcio. Estinta Junulara Komisiono jam ne taugis por bezonoj de junularo. Preskaŭ tradicie / en nia asocio / kiel gvidanto estis elektita virino - 23jara Marie Vančurová, studentino de Universitato en Praha. Dum la Konferenco kreis bonan atmosferon enku kultura programo, kiun riĝigis nia membrino kaj profesia aktoŝtato de stata testro en Brno s-ino Růžicková-Pavlinová. Por distro kaj danco ludis kun granda sukceso ĝis frue matene grupo de BARBULOJ. / Sur arkiva foto M. Vančurová dum 67 UK. /

TYRI KLUB

v Praze - Michli byl dne 13.9.1982 svědkem vystoupení skupiny BARBULOJ v programu Potlach. V malém klubovním sále se tísnilo na 200 mladých posluchačů. Naše esperantská skupina, která se stala milým překvapením pro přítomné byla i důstojným partnerem známých ne esperantských skupin Luisiana a Pacifik.

SUR LA BAZO DE ESPERANTO

laboros la projekto por maŝina tradukado, kiun ellaboris dana firmao Chr. Rovsing kaj nederlanda firmao BSO, kaj kiun laŭ la esperoj de la du entreprenoj financos Europa Komuno/EK/. La Komisiono en Bruselo promesis doni 1,5 milionoj da kronoj/denaĵ/ por la unua fazo de la realigo. Oni povos demandi per terminelo ekz. dane al germana detum-stacioj kaj ricevi respondon en dana. Sed la traduko centro fakte estos Esperanto, kiun oni elektis kiel pontlingvon pro simpla gramatiko.

El Belgio anoncis...

Ecole Primaire N.D. de la Paix, Route de Velaine, B- 5101 ERPENT NAMUR, ke de komenco de ĉi tiu lernojaro funkcias ĉe gekneboj de la kvina klaso ebleco elektiti la studadon de Esperanto. Sume el 98 de ĝelernantoj aliĝis al unua kurso 40 gekneboj/ 10 jaraĵ/. Estas intereso, ke tiuj gekneboj ricevu salutkartojn el tuta mondo kaj ankaŭ proponojn por korespondi kun semaguloj. Do kiu volas kuregi ĝi ilin kaj honorigi tiun reran iniciaton skribu ankaŭ al direktoro de lernejo s-ron DELEUZE.

68a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN BUDAPESTO/ 30.7-6.8/.

Ni sciigas al vi, ke UEA decidis akcepti aligkotizojn por la Kongreso el socialismaj landoj en forintoj. Tio signifas, ke ni povos pagi pere de banko en nia mono. Same eblas pagi al TEJO-Kongreso, KELI-konferenco, LIBE-konferenco, eble ankaŭ por pliaj servoj. Tarifoj, tralkalkulitaj al nia mono laŭ kurenta kurso inter forintoj kaj kronoj momente estas proksimume :

1. aligkotizo ĝis 12.31.1982	900,--Kĉs
2. " " 31.03.1983	1.010,--Kĉs
3. " " 18.06.1983	1.135,--Kĉs

Supre notitaj kotizoj validas por t.n. kolektivaj aliĝoj, do por karavanoj. Kiel sciante, la individuaj aliĝoj laŭ Kongresa Regularo kostas pli.

Antaŭvidataj loĝlokoj kaj loĝkostoj :

Ĝustajn ciferojn ni ricevos plej frue en decembro, tarifo estas por unu nokto, unu persono kun matenmango :

1. en studentaj domoj/duŝejo en la koridoro/ en 4-8 litaj cembroj	60,-Kĉs
2. studentaj domoj 2-3 litaj	72 - 120,-Kĉs
3. hotelo dustela	120 - 180,-Kĉs
4. hotelo tristela	210 - 300,-Kĉs
5. hotelo kvarstela	300 - 420,-Kĉs

Organizita mangado/tag+vespermango/ por 1 tago	60 - 70,-Kĉs
Ekskursoj: tuttaga kun tagmango/autobusa/.....	120 - 240,-Kĉs
kvartaga kun kompletaj servoj	900 -1200,-Kĉs

Aliĝkotizoj al IJK kun ĉiuj mangoj,loĝado kaj unutage ekskurso

1500,-Kĉs

KELI kaj IKUE konferencoj/inkluzive mangadon, loĝadon kaj programon/

1500,-Kĉs

Do,kiu decidis veni al 68a UK kaj aliĝis pere de nia esocio laŭ aliĝilo kiun vi trovis en STARTO 4/82, preparu monon kaj estu pretaj baldaŭ sumon sendi al nia konto pere de poŝtmenda-to,kiun vi ricevos aŭ jam ricevis.

STARTO - neprevidelny věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědným redaktorem Zdenko Křimský. Grafická úprava Milan Labašta. Kresby Pavel Rak. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 4.10.1982. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen ředitelstvem pošt Praha pod č. jed. P/1-1267 ze dne 6.4.1979

STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1. Aperas 6 foje jare. Jarabono 24,-Kĉs, por eksterlando 36,-Kĉs aŭ 10,50gld inkluzive sendokostojn. Mendi eblas ĉe niaj perantoj, ĉe UEA aŭ ĉe nia esocio same kiel anoncojn. Redaktoro Zdenko Křimský, grafika aranĝo Milan Labašta, desegnaĵoj Pavel Rak. Transdonita al presejo 4.10.1982.

TVAR


VD TVAR Pardubice je monopolním výrobcem sportovních ochranných přileb značka CASSIDA. Tyto přilby obdržíte v prodejnách Domácích potřeb, Drobného zboží a Mototechny.

Zájemcům zašleme požadovaný typ přilby prostřednictvím našich služeb

TVAR VD

Jägermanova 1682

530 03 PARDUBICE



Produkta koopera-
tivo ZNAK Hradec
Králové aĉetas jenajn
plumarspecojn:
plumaron de ora fazano
plumaron de perdriko
plumaron de numido
kokajn kurtenetojn sur-
kolajn

Prezo de plumaro estos fiksita
post la unira kontrolo en la pro-
dukta kooperativo ZNAK Hradec
Králové. La aĉetsumon ni sendas
perpoŝte. Plumaron sendu laŭ la a-
dreso

ZNAK výrobní družstvo,
Pražská 686/501 01 Hradec Králové